
# BONA ESPERO



**Cirkulero 47** por la membroj
de "Bona Espero" r.a., prezidanto:
s-ino Hedwig Fischer, Gustav-Adolf-Str. 2a
D-48356 Nordwalde
tel. kaj fakso: +49 2573 626

Nordwalde, 97-07-25

Kara membroj,

tiu nekutima alparolo - anstataŭ la kutima "karaj amikoj kaj subtenantoj" - signalas, ke tiu ĉi cirkulero estas interna kaj ne destinata al la publiko.

Vane ni provis, antaŭ la kutima jarĉefkunveno forigi niajn problemojn kun la gvidantoj de Bona Espero en Brazilo. Nun ni devas turni nin tamen al vi, la membroj, kiuj devas decidi, kiel pluprocedi.

Jarkomence ni ankoraŭ ĝiris la monon rezervitan por la kurenta konekso al Bona Espero. Fine de januaro venis mallongo financa raporto. Marĝene Giuseppe Grattapaglia menciis, ke la pli aĝaj knabinoj ne plu povas loĝi en la dometo de Ada en Alto Paraíso. **Fátima** foriris al parencoj en Formosa, **Andréia** kaj **Rosamira** vivas nun en la dometo de la mortinta avino en Alto Paraíso. Kun zorgo kaj iritacio ni petis i.a. pri iliaj adresoj kaj petis klarigojn pri tiuj surprizaj ŝanĝoj.

Ekde tiam Ursula kaj Giuseppe ne plu respondas niajn leterojn, onidire, ĉar ili sentas sin ofenditaj kaj kontrolataj. Ni ricevis leterojn nur de la estrarano **Enivaldo Alves Silva**, loĝanta en Braziljo kaj do pli ol 200 km for de Bona Espero. Lin elektis la kuratoria asembleo dum pasko "kontaktpersono" al ni, alimaniere esprimeble: la ceteraj estraranoj ne plu parolas kun ni.

S-ro Alves Silva, bona konato kaj amiko de ni, vane provis daŭrigi la normalajn kontaktojn. El liaj malrektaj raportoj ni eksciis:

- La kuranta konekso nun fakte realiĝas.

- Je la fino de la lasta lerneja jaro, t.e. ekde decembro, Bona Espero fermis la klasojn 6 ĝis 8. Aline kaj Ursula devis reiri al siaj gepatroj, Roniclean kaj ŝian fratinon reprenis la patrino.

- Krom antaŭlerneja grupeto de 3 etuloj ekzistas momente 5 klasoj kun entute 34 infanoj, inter ili multaj novaj; pri la sorto de aliaj, kiujn ni bone konis, regas silento.

- Ni aŭdis pri jenaj novaj helpantoj aŭ instruistoj:
  **Sônja Hey**, loĝante kun 14 knaboj en la ĉefa domo, instruas Portugalan lingvon en ĉiuj klasoj;
  **Frank** kaj **Edith Schubert** - al ni konataj - loĝante kun siaj du malgrandaj gefiloj en la blanka domo "Mon Chalet": Frank estas meĥanisto de aŭtoj, Edith instruas en la unua klaso;

**Myriangela Naves** (kun fileto) kaj **Maria Luz** intencas rekonstrui la "Pioniran Domon" kaj instruas dancadon kaj arton; **Sérgio Campos** zorgis por la elektra instalado de la konstruata domo en Alto Paraíso kaj planas, ĉi-monate translokiĝi kun sia tuta familio el Campinas (regiono de São Paulo) al Bona Espero por resti pli longe tie. Ni kontrolos tiun informon ankoraŭ.

- Neniu mencio plu pri: **Edinor**, la instruisto pri matematiko el Alto Paraíso; **Patrícia**, kiu verŝajne definitive reiris al Rio de Janeiro; kaj - plej malbone - **Ada** (kaj ŝia fileto Igor), multjara espero por daŭrigi la aferon.

Du junaj Germanaj Esperantistinoj, kiuj printempe helpis kelkajn semajnojn en Bona Espero, liveris niajn leterojn al Andréia kaj Fátima. Intertempe tiuj respondis al ni: ili bonfartas, sed tamen Andréia kaj Rosamira ne scias, de kio vivi.

**Amanda** bedaŭrinde malsukcesis, eniri la ŝtatan universitaton en Braziljo kaj laboras nun dum unu jaro kiel vartistino ("Au-Pair") en Germanujo. Ŝian adreson Bona Espero ne liveris. Ni tamen eltrovis ĝin, kaj Amanda partoprenas momente en la Internacia Junulara Kongreso en Assisi/Italujo, kune kun Till Schönberner kaj Gudrun, Gunnar kaj Harald Fischer, kiujn ŝi ja bone konas.

Kompleta bilanco de Bona Espero por 1996, kian ni dum la lastaj jaroj ĉiam de la kuratoria asembleo dum pasko ricevis, ĉi-jare ne venis. Ankaŭ ne finkalkulo pri la domo en Alto Paraíso, kiu jes estas ekster nia buĝeto, por kiu tamen rektaj donacoj de 11.000 GM iris tra nia kaso. Ni bezonas kaj petis ankaŭ **organizan planon** pri la venontaj jaroj. Eĉ komprenante la neeviteblan fluktuadon de helpantoj kaj infanoj, ni, la subtena societo, certe ja rajtas demandi, kiom longe minimume ges-roj Grattapaglia fidinde restos. Por kio do servu la nova domo en Alto Paraíso, post kiam subite ĉiuj infanoj estas for, kiujn oni volis plusendi de tie al la lernejo en Alto Paraíso. Kaj kiun sorton oni antaŭvidas por tiuj infanoj, kiuj atingas la aĝlimon de la lerneja periodo.

Nia estraro kompilis je la 24a de julio unuanime deklaron, kiu alvokas ges-rojn Grattapaglia al plia kunlaboro. Tiun celon havas ankaŭ du proponoj, kiujn la estraro prezentos al la jarĉefkunveno je la 30a de aŭgusto:

**Proponoj al la jarĉefkunveno de 1997-08-30:**

"La jarĉefkunveno voĉdonu por:
1) La estraro ricevas la komision, insisti pri rekta raportado el Bona Espero.
2) Pro juraj kaŭzoj la estraro rajtas transĝiri buĝetitajn sumojn por 1997 nur, kondiĉe ke Bona Espero liveris kompletan bilancon de 1996 kaj organizan planon por la venontaj jaroj." -

La jarĉefkunveno okazos samtage kun la ĉi-jara kunveno de la Esperantistoj de Landa Ligo Nordrejn-Vestfalia (REVELO). Espereble multaj membroj de nia subtena societo aperos por kundecidi. Povas necesi tre drastaj paŝoj dum la venonta tempo.

Salutas

Hedwig Fischer